

Dek servoj por faciligi vojaĝon en trajnoj ĈD

Sepmil trajnoj kaj duonmiliono da transportitaj pasaĝeroj tage. Tio estas ĉefa plenumo de laboro de Ĉeĥaj fervojoj (ĈD). Sed la servoj por klientaj, kiujn la plej granda ĉeĥa trafikisto proponas, estas pli multaj! Kial plene ne uzi ilin, kiam oni ofte sin proponas pri servoj por faciligi vojaĝadon per trajno? Ni menciuj koncize, kion oni dum vojaĝado kun ĈD povas uzi.

Transportado de pasaĝeroj kun limigita moviĝo

Celo de ĈD estas krei samajn kondiĉojn por vojaĝado al ĉiuj pasaĝeroj, ĉu ili havas limigitan moveblecon, aŭ ne. Stacioj kaj trajnoj tial estas iom-post-iome konstrue adaptataj ankaŭ por rulseĝuloj, sed ne nur por ili.



Buslinio Airport Express

Tiu ĉi buslinio kunligas fervojan stacion *Praha hl. n.* (Praha ĉefa stacio) kun flughaveno *Ruzyně* kaj ebligas komfortan transporton kun bagaĝoj.

kvalito

En konsiston de trajnkategorioj *InterCity*, *EuroCity* kaj *SuperCity* estas envicigataj modernaj klimatizataj pasaĝervagonoj. Refreŝiĝi oni povas en restoraciaj vagonoj. Je dispono estas ankaŭ kontaktilo por elektra tensio 230 V.



Trajnoj de pli alta



Reduktitaj biletprezoj por vojaĝgrupoj

Jam du pasaĝeroj ĉe ĈD estas grupo. Per unu bileto povas vojaĝi ĝis 30 pasaĝeroj, la unua kaj dua ricevas reduktitan prezon 25%, tria kaj ĉiu sekva rabaton 50%.

Pruntejoj de bicikloj

En turisme allogaj regionoj ĈD malfermis pruntejojn de bicikloj. Rekte en la stacio oni povas pruntepreni kvalitajn *Trekking*-biciklon kaj kaskon. La objektojn oni povas redoni en alia stacio.



Veturpreza asistanto

Pri efekte de la plej konvena veturprezo konsilos Veturpreza asistanto (*Cenový asistent ĈD*). Sufiĉas sur www.cd.cz enigi bazindikojn pri planata vojaĝo.


Transportado de bagaĝoj

Elektitaj trajnoj tre facile transportos ankaŭ grandamplajn bagaĝojn, same kiel biciklojn kaj infanĉaretojn. Tiuj ĉi transportligaj trajnoj estas klare nomindikitaj per piktogramo.



Vojaĝo kun hundoj kaj malgrandaj bestoj

El vivaj bestoj oni povas kunpreni en trajnon krom hundo ankaŭ etajn dombestojn kaj aliajn etajn bestojn, se ili estas tute fermitaj en facile transporteblaj kaĝoj kun likimuna fundo.



Kie trovi konsilojn?

Kompletajn informojn pri proponataj priservadaj ofertoj de *ČD* oni povas trovi je www.cd.cz, aŭ al vi konsilos dungito de **Kontakta centro** je telefonnumero 840 122 113.

Servo *ČD Low cost*

Pere de interreta servo *eShop* je www.eshop.cd.cz oni povas aĉeti elektitajn enlandajn kaj internaciajn vojaĝbiletojn, ekz. favorprezajn interregionajn biletojn *eLiška* aŭ internaciajn biletojn *eTiket*.

Kompilis Jindřich Tomášek
Reviziis Heinz Hoffmann

